

Kiel krei rapide allogan kaj malmultekostan afiŝon

Antaŭ komenci labori ...

Pripensu celon de via afiŝo!

Kutime, kiam oni kreas afiŝon ni strebas atingi iun celon (ekzemple: ke homoj aliĝu al iu evento, ke ili vizitu vian retejon, ke ili vizitu vian esperantan kurson, ktp.). Ĉar ili estas diversaj bone pripensu ĉu via celo kongruas kun la jenaj ĝeneralaj (kiujn oni devus sekvi laŭ diversaj studoj, se ni volas esti sukcesaj).

CELO 1: Prezentu solvojn - komprenu kion aktuale la homoj bezonas (identigu bone vian celgrupon)

- Konu vian celgrupon - eksciu pri kio ili "suferas" kaj malkontentas
- Kion ili volas eventuale atingi
- Vendu emociojn
- Via celgrupo ne interesiĝas pri viaj bezonoj - male, ili volas vidi ke vi interesiĝas pri iliaj

CELO 2: Titolo gravas!

- Kaptu atenton en 5 vortoj
- Veku scivolemon - malkaŝu ion, sed ne ĉion!
- Konsilio: Montru ke vi jam ion faris por via celgrupo - Ni trovis solvon kiel batali kontraŭ enuiĝo!

KONKLUDO: Fokusiĝu pri la bezonoj de via celgrupo, ne de vi!

CELO 3: Estu homoj!

- Homoj ŝatas komuniki kun homoj, ne kun la organizo (firmao)!
- Pripensu - ĉu vi mem ŝatus legi vian mesaĝon (tekston?)
- Imagu ke vi skribas al viaj amikoj

CELO 4: Skribu tiel ke oni povas facile legi kaj kompreni kion vi celas.

- Strebu ke via teksto estu klara - uzu ekzemple unu fonton, faru logikajn breĉojn
- Uzu inter titoloj
- "Kolorigu" ŝlosilvortojn

Enmetu ekzemplon!

CELO 5: Skribu rakontojn. Homoj simple ŝatas ilin.

Kial? Ĉar homoj ŝategas rakontojn!

Prezentu vian historion (Imagu vin antaŭ 5 jaroj, kiam vi ankoraŭ estis sen via organizo)

Kunigu vian rakonton kun la rakonto de via celgrupo! (Eble iu havas samajn sentojn ol vi antaŭ 5 jaroj)

Aldonaj rekomendoj ...


1. Pripensu kio faras vian organizon pli "interesan" ol aliaj (Kial vi estas "alia").
2. Uzu fortan titolon - Kaptu la atenton!.
3. Proponu ion kion via celgrupo ne povas rifuzi!
4. Parolu pri avantaĝoj.
5. Prezentu viajn novaĵojn - uzu "advertorial".
6. Certigu la homojn ke kun vi ne ekzistas riskoj.
7. Alvoku por agadi!
8. Montru la aktualecon de via agado.
9. Kreu fidon al via organizo/agado.
10. Uzu ekscitajn grafikaĵojn.
11. Indiku kion fari, ekzemple eniri en retejon por pli da informo.
12. Ne forgesu logotipon! Kreu organizan identecon!

Male, kion certe ne fari ...


- Ne kriu je via celgrupo - laŭeble ne uzu krisignojn.
- Ne uzu pasivojn - ĉu tio sole okazis?
- Nekompreneblaj mallongigoj - imagu ke ni uzos nur mallongigon TEJO en afiŝo por neesperantistoj. Ĉu ili scios aŭtomate kio tio signifas?
- Evitu formulojn: Vi povus rigardi ĉe - pli bone - Pli da informoj vi trovos ĉe...
- Evitu negojn - estu pozitivaj.
- Neniam uzu longajn frazojn.

Koloroj


1. Pripensu ke ekzistas varmaj kaj malvarmaj koloroj.



2. Ekzistas bazaj kaj aldonaj koloroj. Oni laŭeble ne miksu unu "aldonan" koloron kun alia "aldona" de sama kategorio - rekomendite estas uzi neŭtralajn kolorojn kun la "aldonaj".



3. Elektu kolorojn el triangulo.



Litertipo

Eĉ se tio ne ŝajnas je unua pripenso, laŭ studoj 95% de nebilda interreto estas teksto.

Pro tio atentu pri tio ke:

- La litertipo devus reflekti vian personecon kaj kongrui kun la mesaĝo kiun vi ŝatus per via afiŝo disvastigi
- Despli granda estas la tiparo, despli malgrandaj estu la breĉoj inter leteroj.


Kien krei afiŝojn ...

Ni jam trapasis iajn bazajn rekomendojn kaj teoriojn (estas memkopreneble multajn pli "profundajn") kaj nun nia tasko estas efike krei la afiŝon. Bonŝance oni ne nur kreas enretajn programojn por plibeligi viajn fotojn por poste pendigi ĉe diversaj sociaj retoj kaj ricevi ŝatojn, sed oni pensis ankaŭ pri ni "entuziazmaj novuloj en grafikumado" kaj kreis enretan

programaron Canva (<http://canva.com>). Estas retroprogramo por krei afiŝojn sen bezono esti profesia grafikisto.

2 bazaj ŝtupoj por eniri kaj registriĝi ĉe Canva


A. Kreado de uzantokonto



3 eblecoj por registriĝi:


- Vizaĝlibro
- Google + konto
- Surbaze de via mem elektita retpoŝtadreso

B. Elektu kion vi faras (ekzemple: Nonprofit)




Bonvenon, ĉe la ĉefa laborspaco :) Jen, kelkaj informoj pri kion vi povas nun fari:


- Serĉado de via ŝablono




- Pli ol 1 miliono da bildoj disponeblas
- Serĉu vian bildon uzante ŝlosilvortojn
- Poste surklaku vian elementon kaj enmetu dekstren (“drag and drop”)
- Se vi ne kontentas, uzu vian propran bildon!




- Vi povas facile alŝuti bildon laŭ via plaĉo (ne forgesu havi kopirajtojn!)
- 2 eblecoj:
 - klasike elekti bildon serĉante en viaj dosierujoj
 - facile surklaki vian bildon kaj enmeti en via "grafikspaco" ("drag-and-drop")
- Aldonu tekston laŭ via plaĉo



- Elementoj



- Arangoj



Testu vin, kaj plenumu jenan kreativan taskon:

Kreu belan afiŝon en Canva:

- dum 5 minutoj varbante por esperanta aranĝo
- dum 10 minutoj varbante por esperanta kurso
- dum 20 minutoj kun celo efike vendi esperantan libron (iun ajn vi elektas)

Ne hontu komenci, ankaŭ aliaj same kiel vi bezonis tempon por lerni :)

La saman taskon ricevis ankaŭ partoprenintoj de la trejnado pri “Organizado de kampanjoj” okazinta en Teruel, Hispanujo (Junio 2017) kiu okazis kadre de la Erasmus+ projekto pri “Efika komunikado inter organizoj” Jen la rezultoj:

1. Afiŝoj kreitaj en 5 minutoj

Acxetu la flagon
 11 EL 10 ESPERANTISTOJ
 REKOMENDAS!

ESPERANTO
 PLACU

venu al iJK!

ĈU NI HAVAS TRO MULTE DA LIBERA TEMPO?

**NE LERNU
 ESPERANTON!**
 ĜI ŜTELAS VIAN KORON

06.20.20
 JE 18.00

Atendite, venite, zamenite!

Kulturo de
 Esperanto - Grupo

**PEJA -
 SUNO KAJ
 KUNE**

**KIAL
 LERNI
 ESPERANTON?**

Ĝi estas la plej facila, simpla kaj
 egala lingvo.
 Ĝi helpas vin lerni aliajn lingvojn.
 Lernu la internan lingvon!

2. Afiŝoj kreitaj en 10 minutoj

Partoprenu la kurson de Esperanto

Vi ne bedauros!

Subtenu la landon de la Universitato Kongresa.

**ĈU VI PRETAS POR
 LISBONO 2018?**

Aĉetu la flagon de Portugalio - bela, granda, efektiva!

0035 91021 WWW.EKSPERANTO.BR/PT

Erasmus+

PLIBONIGU VIAJN KAPABLOJN

PER ERASMUS+ PROJEKTO



tejo

Ĝi estas membro de tejo kaj havas senpagan kondomon!

KIEL HELPAS VIN ESPERANTO

1. Novaj amikoj lerneinde
2. Eldro de vojaĝi senkoste
3. Bonu ĉiutage al lingvulerneado

Vinilo Lernas!

3. Afisxoj kreitaj en 20 minutoj



Ĉu ankoraŭ ne estas via tempo de la vivo?

PROFESIIĜU per erasmus+

por pliaj informoj tejo www.erasmusesperanto.com

ĜI ĈU MEMBRO DE

tejo

NI HAVAS

REPAGOJN